
# Numerobatalado




| | |
|---|---|
| **Celo:** | praktikado de ciferoj |
| **Celgrupo:** | komencantoj |
| **Antaŭpreparo:** | sur la tabulo estu skribitaj 20 – 40 numeroj, du-, tri- kaj kvarciferaj |
| **Tempo:** | 5 – 10 min. (plus anticipa klarigo) |
| **Ludantoj:** | minimume 6 |

La ludantoj estu dividitaj je almenaŭ 2 grupoj (estas bone, se estas elektitaj ankaŭ „grupestroj”). Ili elektu el inter si po unu personon, kiu staras ĉe la tabulo (dorse al sia grupo), kaj markas la numerojn diritajn de sia grupo. La marko de unu grupo povas esti cirkvito ĉirkaŭ la numero, ĉe la alia X-forma trastreko, ĉe la tria stelformo ĉirkaŭ la numero.
La numerojn povas diri iu ajn el la grupo. Gajnas tiu, kiu kolektas la plej multajn markitajn numerojn.
Je taksado ni kalkulas la kolektitajn numerojn de la grupo, tio estas dividite per la nombro de la grupanoj, kaj rezultas la poentojn.

<u>Varianto</u>: la duciferaj numeroj validas du poentojn, la triciferaj tri… ktp. Tiel ili klopodas trafi la pli grandajn numerojn.

La ludo estas bona ekzercado, freŝigas la laciĝantan grupon, eĉ plenkreskuloj ĉiam ĝuas tiun tre simplan ludon.